FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 4 oktobro/decembro 1994



La partoprenintoj en la IFEF-kongreso de Krems certe memoras la sloganon, kiu estis legebla en la kongresejo:

"Modernaj Fervojoj - Komuna Eŭropo - Novaj impulsoj - Esperanto"

Ĝin transprenis GEFA, kaj ĝi ornamis la grandan salonon de nia jarkunveno en Lübeck

Werben oder sterben

Bemerkenswerte Jahresversammlung in Lübeck

Lübeck, die geschichtsträchtige Hansestadt, lag in herbstlichem Glanz, als die über 90 Teilnehmer zur diesjährigen Jahresversammlung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten (GEFA) anreisten. Das Wochenende vom 7. bis 9. Oktober 1994 bot wiederum ein reichhaltiges Programm. Als Tagungsstätte hatte K. Böhnke, Beauftragter für Esperanto im Bezirk Hamburg, das Restaurant "Gemeinnützige" gewählt. Dort fand man sich am Freitagabend zum gemütlichen Zusammensein ein. Ein gut gemachter Tonfilm der BSW-Gruppe Lübeck zeigte die Sehenswürdigkeiten der historischen Altstadt, die die Teilnehmer am nächsten Vormittag ausgiebig besichtigten. Zu Recht verkündete der überreichte Stadtprospekt: Wir haben Weltkultur und Meer. Die "Lübecker Nachrichten" widmeten der GEFA-Tagung einen mehrspaltigen Artikel mit der Überschrift "Die Kunst der Verständigung".

Unter der bewährten Leitung des Vorsitzenden J. Gießner bewältigten Vorstand und Beauftragte der Vereinigung eine umfangreiche Tagesordnung. Behandelt wurden u.a. die bevorstehenden nationalen und internationalen Tagungen, z. B. das Seniorentreffen im April in Würzburg und der internationale Kongreß in Pécs (Ungarn) im Mai 1995. Der Schwerpunkt lag jedoch auf der Frage, mit welchen Mitteln der Mitgliederschwund überwunden werden könne. Werben oder sterben auf diese Kurzform konnte man die rege Diskussion über die künftigen Aufgaben bringen. Es gab aber auch Positives zu berichten. GEFA-Mitglieder arbeiten in der international zusammengesetzten Kommission, die im Auftrag des Internationalen Eisenbahn-Verbandes (UIC) alle vorgegebenen Eisenbahnfachwörter in Esperanto übersetzt. Siehe auch den Artikel Nova Fervoja Terminaro.

Im Rahmen des Beiprogramms besichtigten die Tagungsteilnehmer einige der fünf großen Kirchen mit der für Norddeutschland typischen Backsteingotik. Sie bewunderten das berühmte Rathaus mit seinem Bürgerschaftssaal oder das freskengeschmückte Heiligen-Geist-Hospital, die Fassaden der Giebelhäuser und deren malerische Hinterhöfe. Nach gemeinsamem Mittagessen ging es mit dem Bus zum nahen Ostseehafen Lübeck-Travemünde. Bei einer Schiffsrundfahrt in der Lübecker Bucht, begleitet vom traditionellen sonnigen Wetter, gab es Kaffee und Torte. Am Festabend fehlte leider örtliche Prominenz. Immerhin lag jeder Tagungsmappe ein Begrüßungsschreiben des Stadtpräsidenten und Bürgermeisters bei. Die Vorsitzende des Deutschen Esperanto-Bundes (GEA), Frau E. Bormann, richtete ihre Grußworte persönlich an die Versammlung, dgl folgende ausländische Delegierte: L. de Sutter (Belgien), E. Mateeva (Bulgarien), A. Birkbak (Dänemark), J. Bultmann (Niederlande), F. Scharf (Österreich), E. Orban (Rumänien) und A. Fiechter

(Schweiz). J. Gießner, GEFA-Vorsitzender, überbrachte Grußbotschaften des französischen Landesverbandes (FFEA), des IFEF-Vorstandes sowie des Hauptvorstandes des BSW, während für den BSW-Bezirk Hamburg Herr Wunsch die Versammlung herzlich begrüßte. Die Herren M. Smyĉka (Bariton) und J. Zimmel (am Flügel) ernteten mit ihren Darbietungen bekannter klassischer Gesänge, gesungen in Esperanto, verdienten Beifall, ebenfalls die reizende japanische Sängerin Hayumi Nagata. Ein reich ausgestatteter Bücherstand bot Esperanto-Literatur und -Musikkassetten an. Für die Tanzlustigen spielte das ausgezeichnete Orchester Stefan Kory bis Mitternacht flotte Weisen.
Im Mittelpunkt der sonntäglichen Matinee stand ein Vortrag von H. Jasmann (Berlin): "Wie können wir neue Mitglieder gewinnen?". Er schlug gut vorbereitete Informationsveranstaltungen bei den BSW-Ortsstellen vor. Dr. W. Bormann (Hamburg) regte an, neue Mitglieder auch aus anderen Verkehrsunternehmen zuwerben. Musikalisch wurde die Abschlußveranstaltung vom Lovis-Trio der Musikschule Lübeck umrahmt. J. Gießner dankte allen Beteiligten für das gute Gelingen und lud zur 39. Jahresversammlung ein. Sie wird voraussichtlich vom 6. bis 8. Oktober 1995 in Zwickau (Sachsen) stattfinden. W.B.

Jarraporto 1994

pri la periodo de la 37a ĝis 38a jarkunvenoj (Titisee - Lübeck)

Enkonduko
La kunigado kaj privatigo de la du germanaj fervojoj sub nuna nomo "Deutsche Bahn AG" okazis kun efiko de l' 1a de januaro 1994. Ekde tiu tago pli kaj pli da decidaj ŝanĝoj en la fervoja strukturo okazis(as). Oni rimarkas tion ĉie ajn en la organiza formo. Grandstile malaperas deĵorejoj, eĉ tiaj, kie iam ĉefoj estis ĉefinspektoroj (Amtmann) aŭ eĉ pli altrangaj kolegoj. Oni simple administras ilin flanke de iu centra oficejo. Raciigado, forigo de personaro kaj profito estas plej gravaj principoj. Plej alta celo estas, per ĉiu ajn rimedo atingi, ke la fervojo "skribas nigrajn ciferojn". Kompreneble tiu interna politiko ne lasas netuŝita la socialajn institucioĵn de la personaro, do ankaŭ la Socialan Organizon, en kies kadro okazas la libertempa agado de la fervojistoj. Pri la ĉirilataj ŝanĝoj, kiujn oni jam ekrimarkas, ne jam eblas prognozi la finajn staton kaj konsekvencojn. Ĉiukaze oni devas konstati, ke inter la fervojistoj ekzistas nekontenteco kaj malsekureco. Tio naskas kompletan malintereson por nematerialismaj aferoj, kiel estas nia lingvo Esperanto. Tio tamen nur povas plifortigi la postulon al ni mem, klopodegi kaj daŭre klopodegi por savi nian asocion. Grava helpilo por tio estu inter alie nia nova agadplano, pri kiu bonvolu legi aliloke en ĉi raporto kaj numero.

Niaj mortintoj

Denove la morto rikoltis el niaj vicoj. Jen la nomoj de la forpasintaj membroj, pri kies morto ni estis informitaj:

Jocham	Gebhard	(79)	24. 6. 93
Giese	Kurt	(65)	
Gorus	Georg	(79)	
Klaffs	Walter	(72)	
Terjung	Luise	(62)	23. 3, 94
Pape	Hermann		28. 4. 94
Barnickel	Elisabeth		29. 5. 94
Macek	Kurt	(77)	
Huber	Richard	(82)	2o. 7. 94

Ili ripozu en paco!

Naskiĝtagoj (rondaj de aktivuloj), al kiuj GEFA gratulis: Gießner Joachim 80; Kruse Elfriede 80, Schrapp Joachim 80; Herlitze Erhard 70.

Menciindaj naskiĝtagoj

Joachim Schrapp fariĝis 80 jarojn la 30an de aŭgusto 1994. GEFA skribe gratulis al tiu malnova senlaca aktivulo, kiu dum multaj jaroj kunlaboris en grupo kaj distrikto Münster, en la estraro de GEFA kaj ankaŭ kiel germana komitatano. Tiel longe, kiel permesis lia sanstato, li ĉiam helpis, kiam helpo estis bezonata.

Johann Lorenzkowski (Münster) atingis la 80an jaron en junio 1994. Tre malnova membro, partoprenis jam en la 3a IFK en Paris. Ankoraŭ nun li aktive partoprenas en la vivo de la grupo.

5. 9. 94 Ernst Kozerke, Köln, 80 jarojn; 8. 9. 94 Elisabeth Kopietz, Brilon, 80 jarojn, ambaŭ fidelaj membroj. 25. 10. 94 Rolf Terjung, Duisburg, 65 jarojn. Ni aparte gratulis al nia ĉiam vigla aktivulo, distrikta komisiito en Essen kaj prizorganto de la emeritulaj renkontiĝoj.

Ankaŭ ĉi loke ni dankas al ili pro ĉio, kion ili faris kaj faras por GEFA. Ni deziras ankoraŭ multajn vivojarojn en bona sanstato.

1. ORGANIZAJ AFEROJ

1.1 Membrostato

La nombro de la membroj anoncitaj al BSW iom kreskis de 346 al 356. Sed tio estas nur ŝajna gajno, ĉar ĝi inkludas la transprenon de 23 membroj el la fakgrupoj en la iama DDR. Fakte ni denove perdis membrojn pro forpaso.

1.2 Kursoj

El du distriktoj estis anoncita partopreno en kursoj de aliaj organizoj, kio tamen kaj bedaŭrinde ne kaŭzis aliĝon de novaj membroj.

Verve kaj senlace la komisiito por instruado, Fritz Lautenbach, gvidas la telekurson. Sed ankaŭ rilate al ĝi montriĝas, kiel malfacile estas mobilizi intereson por nia lingvo inter la fervojistoj.

1.3. Funkciuloj

La situacio karakterizita sub "Enkonduko" ankaŭ inter niaj funkciuloj denove kaŭzis ŝanĝon. La membro de la laborkonsilantaro (Arbeitsausschuß), Achim Meinel, ne plu deĵoras ĉe la fervojo. Anstataŭas lin (ankaŭ kiel distriktkomisiiton Berlin) Horst Jasmann (Komp. "Ferv. Esperantisto 2/94

lastan paĝon). Pluraj ŝanĝoj ne okazis.
Jen estas loko por danki al ĉiuj, kiuj ofte jam dum multaj jaroj fidele kaj senbrue donas tempon, energion, eĉ monon por vivteni nian asocion GEFA. Estas nur sekaj vortoj, sed sinceraj.

2. KUNLABORO KUN IFEF

En la 46a IFK Krems (A) partoprenis 65 germanoj. Entute ĝi estis ĉarma kongreso en ĉarma regiono. Fake, kulture kaj turiste ĝi donis bonajn impresojn, kvankam en la prezentaĵoj denove nia lingvo apenaŭ ludis rolon, sed superregis la germana.

3. ARANĜOJ, KONTAKTOJ

La 37a jarkunveno okazis de 8a ĝis 10a de oktobro 1993 en Titisee. Partoprenis 92 personoj, inter ili 11 eksterlandanoj el 5 landoj. La varia programo kiel kutime donis agrablajn horojn en amikeca etoso. En la laborkunsido oni pritraktis apud organizaj temoj ĉefe la membrosituacion kaj la novan agadplanon (komp. 4.4). Dua laborkunsido okazis en Fulda.
Kiel kutime GEFA-membroj vizitis diverslandajn aranĝojn kaj ankaŭ la UK-on en Seoul. La prezidanto kunagis en jenaj aranĝoj: kunvenoj en Katowice kaj Varsovio; kunveno aranĝita de BSW-ĉefestraro; reprezentis FISAIC okaze de tutlanda renkontiĝo de la rumana FISAIC-sekcio kaj fondo de tiea pentrista sekcio, kaj duan fojon en simila aranĝo en Rumanio reprezentis la estrarojn de IFEF kaj FISAIC. Krome li estis en la printempa estrarkunveno de IFEF kaj reprezentanto de IFEF en du UIC-kunvenoj en Frankfurt (M) kaj Budapest, kie oni pritraktis la evoluon de la UIC-terminaro.
La vicprezidanto reprezentis GEFA en la ĉeĥa jarkunveno en Podébrady. La sekretario same agis en la GEA-kongreso Kiel.

4. INFORMADO, VARBADO

4.1 Fervoja Esperantisto (antaŭe "Bulteno")

Ekde la unua numero de la jaro 1994 nia organo havas la nomon "Fervoja Esperantisto". Pri la kaŭzoj de la titol-ŝanĝo ni detale raportis en n-ro 1/94, same kiel pri la produktmaniero kaj la redukto de la eldonaĵoj de kvin al kvar. Sekve FE aperas nun kvarfoje jare kun entute 32 paĝoj.
En 1993 "Bulteno" aperis kvarfoje kun 32 paĝoj kaj 5 fotoj.

4.2 Komunikiloj

Ni povis konstati 58 artikolojn en ĉiutagaj gazetoj kaj en organoj de BSW aŭ de la fervojo.

4.3 Informiloj, ekspozicioj

Centoj da informiloj denove estis disdonitaj en deĵorejoj, hejmoj de BSW, dum vojaĝoj ktp. Kontentige vendiĝis la trikolora glumarko "Esperanto - deine zweite Sprache". Ankoraŭ troviĝas provizo ĉe la kasisto. Okazis tri ekspozicioj en distriktoj Frankfurt, Köln kaj Stuttgart kun ĉirkaŭ mil vizitantoj.

4.4 Agadplano

Kompletige al la de longe valida laborplano IFEF lanĉis agadplanon kaj petis la landajn asociojn, realigi ĝin laŭ siaj cirkonstancoj. Inter-

tempe la GEFA - estraro formulis provizoran germanan agadplanon, kiu fariĝu bazo por estonta agado. Celo estas, pli ekzakte difini la direkton kaj celojn de la interna planado kaj agado, ĉefe por altiri pli da novaj membroj.

5. EMERITULOJ

En 1994 la emerituloj renkontiĝis 21. 4. en Kassel. 34 personoj travivis agrablajn horojn inter malnovaj amikoj kaj konatoj. Dankon al ĉiuj, kiuj helpis kaj al BSW, kiu denove subvenciis la renkontiĝon.

6. TERMINARA AGADO

La ambaŭdirekta Nacia Vortaro, kiun GEFA eldonis pasintjare, volonte estas akceptita, ankaŭ en germanlingva eksterlando. La modesta prezo de 19.50. DM, je samtempa mendo de tri ekz. eĉ nur 17.50 DM po ekz., plifaciligas aĉetadon. Tiun terminaron fervojistoj kaj ankaŭ nefervojistoj bezonas por ĝuste kompreni fervojfakajn artikolojn kaj ankaŭ por tiajn verki. Du germanaj membroj kunlaboras en la Faka Komisiono de IFEF, nome d-ro Heinz Hoffmann kiel sekretario de terminara sekcio kaj Heinz Dieter Hartig kiel redaktoro de "Terminara Kuriero". Germana kunlaboranto en la komisiono estas Horst Theurich.

7. PERSPEKTIVO

La perspektivo nur povas esti konkludo el tio, kion vi povas legi en la enkonduko: ni strečegu niajn fortojn daŭre kaj seninterrompe, por helpi al nia asocio GEFA. Ni alfrontu la malfavoran situacion kaj pruvu, ke Esperanto por ni estas pli ol nura ĝuo kaj hobio.

Gießner
prezidanto

Nova Fervoja Terminaro

Laŭ informo de Germana Fervojo (DB) aperas en Novembro 1994 la "Fakterminaro de Fervojo". Ĝi sekvas la kvaran eldonon de la "UIC-Leksikono" aperinta en 1988. Kolego Ritterspach siatempe eldonis por IFEF la version en Esperanto, kiun transformis kolego Hartig en Nacian Terminaron Esperanto - Germanan. La nova Fervoja Terminaro estas ellaborita por la lingvoj angla (en), franca (fr), germana (de), hispana (es), hungara (hu), itala (it), nederlanda (nl), pola (pl), portugala (pt), sveda (sv) kaj Esperanto (eo). Ĉiuj versioj estas haveblaj kiel kompaktdisko CD-ROM, diskedoj aŭ du- respektive trilingvaj libroj.

En "Bekanntgaben Deutsche Bahn" Nr. 361/94 oni informas pri la mendo-kondiĉoj. La prezo por CD-ROM estas 600 DM, por dulingva terminaro 60 DM, por trilingva 100 DM, ambaŭ en laŭvola kombinaĵo. Mendojn oni direktu skribe al UIC RailLex, c/o DB, ZIB 1A Schmidt, Stephensonstr. 1, 60326 Frankfurt/Main. La mendo devas enhavi jenan deklaron en germana lingvo: "Ich (wir) verpflichte(n) mich/uns, die bestellten CD-ROM (Disketten, Bücher) nicht an Dritte weiterzugeben. Es ist

mir/uns bekannt, daß bei Verstoß der UIC Regreßansprüche zustehen." La adreso de la mendanto enhavu la poŝtkodon. Por dulingva aŭ trilingva libro oni indiku la lingvokombinaĵon laŭ la supre menciitaj kodliteroj (ekz. de/eo).
La elektronikaj produktoj ĉiujare estos plivastigataj kaj aktualigataj. Krome oni preparas fervojfakajn terminarojn en aliaj lingvoj, inter ili la dana, letona, norvega, rusa kaj ĉeĥa. Se la kunlaboro de IFEF pere de la Faka Komisiono kun UIC povos esti daŭrigata, rezultos kontinua, streĉa kaj sukcesplena laboro por la internacia IFEF-skipo. W. B. kaj GEFA

Por via kongresplanado

Jen la rapidaj trajnoj de Budapest al Pécs: Budapest Déli pu for: 6.35, 7.30*, 10.05, 11.30*, 15.30*, 16.30
Pécs alveno:
9.45, 10.05, 13.20, 14.05, 18.05, 19.45
*= Sidloka rezervilo necesa; la trajno 11.30 nur (1) ĝis (6).
Por plifaciligi la vojaĝon al la kongreslokoPécs, niaj aŭstraj kolegoj organizos antaŭkongreseton en Vieno de 18. 5. (alveno) ĝis 20. 5. (komuna forveturo) kun alloga programo. Aliĝilojn petu ĉe la redakcio de FE. Baldaŭa aliĝo rekomendinda, ĉar nur 40 lokoj!

ARANĜOJ

La **IFEF-Skisemajno** 18. - 25. 3. en Mühlbach (Austrio). Priatentu IF.

La printempa **kunsido de la laborkonsilantaro kun la komisiitoj** okazos la 8an de aprilo 1995 en Fulda kiel kutime.

La **emeritula renkontiĝo** 20. 4. 95 en Würzburg. Detaloj en FE 1/95.

Fervojaj Novaĵoj

Duetaĝa relaŭtobuso
Konate estas, ke la trajnoj sur multaj neĉefaj linioj ne sufiĉe amplekse estas uzataj. La konsekvenco estis, ke dum la pasintaj jardekoj mulnombraj tiaj linioj estis malfunkciigitaj. Kaj ankaŭ nun multaj linioj estas minacataj suferi la saman sorton. Temas senescepte pri t.n. publika kurtdistanca trafiko.
Aliflanke la individua trafiko sur ŝoseoj kaj en urboj atingis tiel teruran dimension, ke tie kaj tie okazas kolapsoj. La risko de akcidentoj kaj la konataj danĝeroj por plantoj kaj atmosfero daŭre kreskas.
Kiel alternativon oni nun intencas elprovi novan vojon, por logi la nervostreĉitajn aŭtomobilistojn en ĉiutaga kurtdistanca trafiko al ekologie kaj preze favora, rapida kaj komforta fervoja veturilo. Sur la linio Göttingen - Bodenfelde (37 km) ekde somero 1995 oni planas veturigi duetaĝan relaŭtobuson laŭ naveta trafiko. Ekstere vidite tiu relbuso iom similas al la konataj ruĝaj busoj en Londono,

sed ĝi funkcias kiel fervoja motorvagono. Ĝi estas destinita por neĉefaj kaj eble eĉ por jam malfunkciigitaj linioj. Ĝi povas transporti 100 pasaĝerojn, havos 2 kondukejojn, estos 3.10m larĝa kaj klimatizita. Kostoj 1.3 milionoj da markoj. Senprobleme ĝi permesos transporti biciklojn, infanĉarojn kaj rulseĝojn. Maksimuma rapideco estos 100 km/h.
Fonto: Harzkurier Jogi

La Innsbruckanoj pli bone povas dormi

250 trajnoj tagnokte ĝis nun transveturis la Brenner-pasejon sur linio Innsbruck - Verona. Sed nun estas eĉ ĝis 320 trajnoj. Kiel tio eblas?
Apud Innsbruck la Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj konstruis novan dutrakan ĉirkaŭlinion 14.9 km longan. Ĝi debranĉiĝas de la ĉeflinio Wörgl - Innsbruck, krucas la riveron Inn per nova ponto, poste kondukas tra nova, 12.9 km longa tunelo kaj atingas la linion Innsbruck - Verona. La kostoj por la tuta ĉirkaŭtraceo estis 430 milionoj da markoj.

Tiu nova linio prefere estas uzata de vartrajnoj, kiuj trafikas inter Germanio kaj Italio kaj inverse. La grandaj avantaĝoj estas: La veturtempo al Brennerpasejo konsiderinde estas mallongigita, ĉirkaŭ 50 pluraj trajnoj rulas nun, sed samtempe pli ol 50 trajnoj pli malmulte preterveturas la loĝkvartalojn, tiel ke miloj da homoj nokte pli trankvile povas dormi.
Fonto: BahnZeit

Jogi

Ni funebras

Multaj el niaj maljunaj membroj memoras la iaman prezidantinon de la franca asocio FFEA, Germaine Lemonnier, honora membro de IFEF. Ŝi forpasis la 28an de sept. 1994. Ŝi estis inter la unuaj gravuloj de IFEF, konata figuro en multaj kongresoj, kie ŝi ĉiam amikece kaj objektive diskutis. Ni funebras kun niaj francaj kolegoj.

Al niaj membroj kaj legantoj ni deziras benitajn kristnaskajn tagojn, por la Nova Jaro 1995 agrablan komenciĝon kaj por la tuta jaro sanon, ĝojon kaj ne ĉagrenon. GEFA

Redaktfino por n-ro 1/95 estos la 28. 2. 95
Herausgeber/eldonanto: Bahn- Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main.
Schriftleitung/redakcio: Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, 37412 Herzberg am Harz.
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Kleine Annenstr. 34, 28199 Bremen.
Druck/preso: Druckerei u. Verlag Otto Zander, Lindenstr. 16, 37412 Herzberg am Harz.